# TEJO-aktuale: numero 141, 2004-06-08

---

T E J O - A K T U A L E N-ro 141 (8 junio 2004)

---

Senpaga informletero de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
<http://www.tejo.org>;

---

1. INTERKULTURA KVIZO--KUN PREMIO!
2. RAKONTU AL NI VIAJN INTERKULTURAJN SPERTOJN!
3. RESTAS SES TAGOJ POR KANDIDATIĜI!
4. C-KANDIDATOJ SERĈATAJ
5. KONTRIBUU AL LA TAGORDO
6. KION VI OPINIAS PRI TA?

---

1. INTERKULTURA KVIZO--KUN PREMIO!

La projekto "Interkulturo" <www.interkulturo.net> invitas vin ĉiujn
partopreni kvizon pri la temo "Urboj de la mondo"! Testu viajn sciojn!
La limdato por respondi al la kvizo estas la 14-a de junio--do agu rapide!
La gajninto ricevos premion (libron). Trovu la kvizon ĉe:
<http://www.interkulturo.net/kvizoj/listo.php>;.

---

2. RAKONTU AL NI VIAJN INTERKULTURAJN SPERTOJN!

La projekto "Interkulturo" lanĉas konkurson pri la plej interesa
interkultura sperto. Lasu viajn rakontojn je la retpaĝo
<http://www.interkulturo.net/vikio/index/Interkulturaj_Spertoj>;
aŭ retpoŝtu ilin al la adreso <katja@tejo.org>. La gajninto estos
anoncita en aŭgusto. La plej bonaj rakontoj estos publikitaj en TEJO-revuoj.

---

3. RESTAS SES TAGOJ POR KANDIDATIĜI!

Restas SES tagoj por anonci vin kandidato por B-komitataneco en la
TEJO-komitato! Ne maltrafu la okazon partopreni la demokratian funkciadon
de VIA organizaĵo! Kondiĉoj troveblas en TEJO Tutmonde 2003:4/2004:1 aŭ
kontaktu la TEJO-oficejon <oficejo@tejo.org>. Kandidatiĝoj devas alveni
antaŭ la 15-a de junio! <aleks@tejo.org>.

---

4. C-KANDIDATOJ SERĈATAJ

Venontmonate, dum la 60-a IJK, la TEJO-komitato elektos komitatanojn C
(komitatanoj elektitaj de komitatanoj A kaj B). Nun kandidatoj estas
serĉataj. Por pli da informoj kontaktu la Ĝeneralan Sekretarion, Aleks
KADAR <aleks@tejo.org>.

---

5. KONTRIBUU AL LA TAGORDO

Ĉu vi, TEJO-membro, havas proponon aŭ diskutindaĵon por la Komitato de
TEJO? Jen via okazo aldoni al la tagordo de la venonta komitatkunsido!
Sendu viajn proponojn, plendojn aŭ diskutindaĵojn al la Ĝenerala
Sekretario <aleks@tejo.org>

---

6. KION VI OPINIAS PRI TA?

Do, kion vi, kara leganto, opinias pri TEJO Aktuale? La redaktoro bonvenigas viajn komentojn, sugestojn kaj plendojn! <TEJO-aktuale@tejo.org>. Cetere, ni pardonpetas pro la lastatempaj dissendproblemoj, kaŭzitaj de misfunkciado de Abonu.com. Kaj ne forgesu pri la TA-retejo <www.tejo.org/tejo-aktuale>. Kaj, kiel ĉiam, la redaktoro tre atendas viajn kontribuojn!

---

TEJO-AKTUALE - Senpaga informletero de TEJO

La ideo: <http://www.esperanto.org/tejo/publikajhoj/aktuale/koncepto.html>;.
La arkivo: <http://www.tejo.org/tejo-aktuale>;.
La aliĝo: <http://www.abonu.com/catalog/info.tejo>;
Informojn kaj komentojn sendu al <aktuale-red@tejo.org>.
La teamo de TEJO-aktuale estas:
Jevgenij GAUS, Joel AMIS.
Tiun ĉi numeron redaktis Joel AMIS.